TEA-BULTENO

15A JARO **SEPTEMBRO - OKTOBRO 2012** **NUMEROJ 9-10**

Kredu ĉion kion oni diras pri la mondo: nenio estas tro malbela por ne esti ebla.
Honoré de Balzac (1799-1850)

Kara Legantaro!

Preskaŭ jam for somero, varma, arda, konstante brilsuna somero: aŭtuno plej baldaŭ enpaŝos, kunportante espereble iom da refreŝiĝo, abundan pluvon, kiu sensoifigos, almenaŭ iomete, la nuntempe tre suferantan naturon. Kaj Vi? Kiel vi pasigis vian feriadan periodon? Kredeble tre bone kaj dum tiu tempo vi eĉ multon ripozis, ĉu ne?, tiel ke ja vi sentas vin energioplena kaj forta, preta tuj aktiviĝi kaj ekagi kune kun la aliaj TEA-anoj por niaj kutimaj celoj. Pro tio ni multnombre atendas vin okaze de la unua renkontiĝo, post du-monata fermo de la sidejo, **vendredon la 7an de septembro, ekde la 19-a horo!**

Malgraŭ feriado, tamen intertempe kelkaj asocianoj laboris, laboregis en TEA, ordigante kaj katalogante ĵurnalojn, revuojn, dokumentaron, librojn ks: tio por ke ankaŭ vi povu ĝui, danke al pli simpla konsultsistemo, la riĉajn kaj valorajn publikigaĵojn de TEA-arkivo, ekde 1906 ĝis hodiaŭa jaro. Histori-esplorantoj trovos imponan materialon por siaj serĉadoj! Temis pri laciga laboro, ankaŭ pro la sufoka varmo, sed ... valoris la peno! Eĉ ne imageblas, kiaj trezoroj kaŝiĝas en VIAJ biblioteko kaj ĵurnal-arkivo! Pri nur unu el tiuj, ĵus malkovrita en malhela angulo, mi ŝatus paroli, eĉ ne, mi ne parolos pri ĝi: ĝi mem sin prezentos per kelkaj eltiraĵoj! Mi atendas vian komenton, vian opinion, eĉ telefonan: tio ja kontentigos min, ĉar tio signifas ke vi estis leginta la asocian Bultenon, kiu jam de 15 jaroj enuigas vin! Bonan legadon kaj ek al agado!

Via Elda



Majo 1906 - 1-a Jaro - N-ro 5
Redaktoro: F.ino OXENFORD
16, Upper Westbourne Villas
Hovo, Sussex, England
24 paĝoj - kovrilo kartoneta

REDAKTORA BABILAĴO.

Pri kio ni babilos hodiaŭ? Apenaŭ ni scias![1] La legantojn amuze logos la rimarkoj de la Kritikisto[2]. Ni certe presas ĝin por montri ke ni ne zorgas, ĉu li pensas ŝate aŭ malŝate pri la gazeto. [...] Ĉiumonate ni elŝiras niajn harojn kaj grincigas la dentojn, ĝis ili estas pulvorigitaj. Kial? Pro la preseraroj, kiujn ĉiam ni vidas sur la paĝoj de la gazeto [...] Vere ni estas koleraj, vidante ilin, kiam estas tro malfrue por ilin korekti, spite niajn penojn ilin eviti. Pro tiu ĉi ni petas pardonon al ĉiuj verkistoj kies vortoj estas nekorekte silabataj, aŭ en kiuj estas translokitaj literoj: ni tie ĉi certigas la legantojn, ke la eraroj ne estas en la manuskriptoj, sed nur en niaj paĝoj. Ni bedaŭrinde faras ilin dum ni tranĉas la vaksfoliojn.

[...] Ni ricevis kelkajn leterojn pri la rimarkoj de la 'Kritikisto' en la lasta numero, unu aŭ du el ili estis ... iom malafablaj. Al tiuj, kiuj ne ŝatas nian gazeton nia respondo estas la jena:

Kiel eble plej ĝentile ni rememorigas al ili, ke neniel ni petis, ke ili abonu ĝin. Kiam oni ĝin petas, ni sendas ekzempleron: se la petinto ŝatas la ĵurnaleton -- bone! Se ĝi ne plaĉas al li -- estas egale bone! La afero estas finita. [...] Tial ni petas, ke neniu abonu aŭ aĉetu kopion, se ili vere ne ŝatas ĝin aŭ ĉar ili pensas, ke ili devas aĉeti ĉiujn esperantajn ĵurnalojn. Ni havas bonajn, fidelajn amikojn en multaj landoj, kiuj subtenas nin, kaj kiuj plezure legas la gazeteton. Tio estas sufiĉa por ni. [...]

Fraŭlino C. Oxenford

1) N.d.r: ankaŭ tiam ili havis miajn samajn problemojn: plej komplike ĉiam estas ekskribi la enkondukan artikoleton!

2) Rubriko, sensubskriba, kun kritiko pri la gazeteta enhavo.

Kia la diferenco inter tiu ĉiumonata 'gazeteto' de 1906 kaj ĉi bulteno de 2012? Kompreneble ke oni devus legi la tutan enhavon de 'La Esperanta Studento' por juĝi plej juste kaj konscie. Nu, ĝi estas je dispono de interesatoj ĉe TEA-sidejo.

Pri la lingvo: ĝi estas facile komprenebla, kvankam tie kaj tie legeblas kelkaj arkaikaj vortoj aŭ esprimoj. Interesaj estas la diversaj rakontetoj, noveletoj, plejparte tradukitaj, el angla literaturo aŭ el britaj ĵurnaloj, kiel ekz. "*Daily Telegraph*", aŭ priskriboj de vidindaĵoj el aliaj landoj. Entute en ĝi oni ne pritraktas primovadaĵojn kaj kelkaj, eĉ tutpaĝaj, krajonfaritaj desegnaĵoj ornamas elegante la paĝojn.

Kaj por fini, vidu sekvapaĝe, kiel oni ridis en 1906!



LAGRANDEGA RABISTO

Kutime mi ne ofte ekŝaltas la televidon: nur por kunestadi kun io (se eĉ nur maŝino) dum la vespermanĝo – fakte mi estas sola. Ne tro ŝatas mi rigardi televidelsendojn, precipe kaŭze de la reklama tamtamado**,** kiu abrupte enrompas, ĝeneganta per siaj mensogaj prezentoj kaj promesoj. Do, ĉio ŝajnas nur preteksto por distrumpeti ĉarlatane kaj persvadi insistmaniere pri la mirigaj kvalitoj de tio ĉi aŭ tio, per allogaj ofertoj aŭ per ŝorcaj rigardoj de belegaj virinoj.

Tasko de televido devus esti ebligi spekti tion, malproksime okazantan, en lokoj kie malfacilas ĉeesti: eventojn, sportajn konkursojn – kiel la ĵus finiĝintajn Olimpikajn en Londono – solenaĵojn, spektaklojn – eĉ tiujn cirkajn, de mi tre ŝatatajn ĉar tie la homo admirindas pro siaj akrobataĵoj. Krome, televido kapablas plivastigi la konon pri la mondo per kulturfilmoj rilate al historio, scienco aŭ naturo. Tiu lasta temo – NATURO – ĉiam pli furoras nuntempe, ne nur per artikoloj, per studaĵoj en revuoj, ĵurnaloj ks, sed precipe en televido, per dokumentaj filmoj. Zorge, precize, ni informiĝas pri elvokivaj, ekzotaj landoj, pri plejeble malsamaj kultivadoj, pri la vivo kaj kutimoj de sovaĝaj bestoj, cele al komprenigo de la vivanta mondo nin cirkaŭanta. Tiaj programoj pluras ĉe televido: *"Geo"*, *"Alle falde del Kilimangiaro"*, "*Missione Natura*" **(*)** ks, kiuj permesas "virtuale" vojaĝi tra la tuta planedo kaj tiel spekti spirhaltigan sunsubiron ĉe Polineziaj insuloj, ritajn dancojn de Afrika tribuo, la timigajn polusajn glaciejojn**,** aŭ viv–kutimon kaj –konduton de sovaĝaj bestoj, kiuj plejfoje aperas en sia ĉefa rolo de rabistoj.

Hieraŭ vespere tuthazarde mi trafis tre interesan kulturfilmon, traktantan pri la praloĝantoj de lando Kebekio en Kanado, la inuitoj, alinomataj ankaŭ eskimoj. Sed tiun ĉi vokmanieron – al ili donitan de la indianoj kaj signifantan «manĝantoj de kruda viando» – ili ne ŝatas kaj preferas nomiĝi «inuitoj», nome, en propra lingvo, «homoj».

Lastatempe la regantoj de Kebekio aplikis al ili la saman politikon, uzitan en Usono por la indianoj, pretekste la «plibonigon de ilia civilizo»**:** ĝi konsistis en konstruado de novaj urbetoj kun belaj domoj, stratoj, placoj, kie ili povos «pli komforte vivi», instruado de nova lingvo, tiu **«**ŝtata**»** komprenebla, anstataŭigo de ilia animista religio per la kristana, kaj similaj produktoj de la «supera» okcidenta kulturo.

Mallonge, la inuitoj estis devigitaj vivi en rezervejoj, ŝanĝante siajn kutimojn kaj morojn pro trudado de tute alia vivsistemo. La efikoj de tiu politiko tute samas al kio okazis en Usono post la starigo de indianaj rezervejoj: pliiĝo de alkoholismo, de psikofizikaj malsanoj, ekapero de tute eksternorma nombro de memmortigoj, kaj similaj sekvoj. Dum la kulturfilmo, tion atestis senesperaj intervjuoj de pluraj viroj kaj virinoj, nostalgie revantaj la pasintan liberon, tra vastegaj kampoj kaj ĉe fiŝoriĉaj riveroj: tragike impresis min la marmora gitaro sur tombo ŝtono de dudekkvaraĝa junulo, sinmortiginta.

Neniel utilis la katastrofa usona sperto: kiam neniiĝas propra identeco, la homo pereas. Ĉu same povus okazi ankaŭ al nia socio?

Abrupte revenis al mia memoro, sciigo pri rondotablo, kiun printempe iniciatis «*Accademia della Crusca*»**(**)** pri ege aktuala temo: enkonduko de anglalingva instruado ĉe italaj universitatoj.

Ekde la jaro 2014 ĉe *Politecnico di Milano*, ne nur unuopaj kursoj sed la tuta instruado okazos anglalingve. Intensa debato ekestis. La Rektoro, iniciatinto de l' projekto, prezentis la proajn argumentojn. Du la ĉefaj: – pliigo de eksterlandaj studentoj, kun sekva ebleco, por la italaj, tuj kontaktiĝi kun samaĝuloj de diversaj deveno kaj kulturo; – kapabligo por italparolantaj studentoj tuj aktivi sur internacia merkato. Pluris la intervenoj de lingvistoj, italaj kaj eksterlandaj, kaj sciencistoj, afable kontraŭaj. Objetoj je tipoj jura, socia, lingva, kultura, kaj krome la fakto ke ĉe la nordeŭropaj landoj – kie ekde multaj jaroj tiu ĉi instruadmetodo kutimas – lastatempe oni estas taksanta la damaĝojn kaŭzitajn de tia sistemo ĉe la sciodiskonigo.

Tio memorigis al mi ankaŭ iun strofon de «*Lingua e Dialettu*» («Lingvo kaj Dialekto»), tiu noblega poemo de Ignazio Buttita, en la sicilia dialekto:

...
Un populu
diventa poviru e servu
quannu ci arrobannu a lingua
addutata di patri:
è persu pi sempri.

...
Popolo
malriĉa kaj sklava fariĝas
kiam al ĝi priŝteliĝas lingvo
parolata de praavoj:
ĝi por ĉiam forperdiĝas.

Do, ĉu ankaŭ homo estas predanto, kiel la bestoj? Jam li rabas ĉion de la naturo: – arbojn por la ligno, legomojn, radikojn; – fruktojn, kies specifaĵo ne estas iĝi ĉefmanĝaĵo por la homo, sed esti la unua esenca nutraĵo favoranta ekĝermon de la

Daŭrigo sekvapaĝe



Gulaŝo laŭ triesta maniero[1]

Pri origino de *goulasch* la opinioj de la diversaj aŭtoroj konkordas nur pri du punktoj: t.e., ke la plado naskiĝis en Hungario kaj ke la nomo devenas el la hungara termino *gulyás*, signifanta "brutgardisto"-n. Ĉiuj aliaj hipotezoj interbatalas unu kontraŭ la alia, enplektiĝas ĝis iĝi malimplikebla nodo, tiom ke la alirvojo al fidindaj informoj pli kaj pli komplikiĝas kaj malproksimiĝas de la realo. Oni eĉ supozas, ke tiu plado estis preparita de la Hunoj, sed tiu tezo ne tiom facile akcepteblas, ĉar la ĉefelementon de gulaŝo - paprikon - oni eltiras el kapsiko, legomo enkondukita en Eŭropon nur post la malkovro de Ameriko.

Tiel, eble pli racie, oni povas atribui al hungara gulaŝo iun, cetere respektindan, aĝon de ĉirkaŭ 250 jaroj. Sed, konsidere ke en Hungario oni taksas kiel originalaĵon nur gulaŝon kun cepoj kaj terpomoj, kiuj lastaj disvastiĝadis tra Eŭropo nur ekde la dua duono de 1700-aj jaroj, tiam oni devus eĉ iomete pli redukti la supre indikitan aĝon.

Kaj nun io pri ties evoluo: enŝoviĝas malrapide kaj kun notindaj malfacilaĵoj la emo ekuzi en Eŭropo alian legomon, la tomaton. Obstine, ĝis antaŭ ne tiom foraj tempoj, oni kontraŭstaris aŭ eĉ ignoris ĝin, precipe en la laŭ-danubaj Landoj, kie la tomato, la tiel dirita "*Paradeisapfel*" (Pomo de l' paradizo), estis konsiderata tute fremda elemento, samkiel la oranĝoj. Neniu mencio pri tiu legomo, ekzemple, troviĝas en la kuirlibro de Maria Elizabeth Maizner, eldonita en Linz, Aŭstrio, en 1818. El tio oni povas konkludi ke la origina recepto tute ne inkluzivis tomatojn kaj ke la tipa ruĝbrika koloro de gulaŝo estas donita de 'malavara' uzo de papriko.

Sed ni revenu al la triesta versio de tiu fama plado, kiun loke oni nomas "*gòlas*". En ĉi kuirmaniero, tomato, prefere koncentrita, estas baza elemento samkiel papriko. Por triestanoj tiu afero de "tomato, jes – tomato, ne" estas fundamente grava.

Ĉu vere, ĉu nevere, onidiroj asertas, ke Triesto estas la unua loko el Mez-eŭropo, kie disvastiĝis abunde tiu legomo, kiu influis 'energie' la kuirarton en ĉi regiono. Sekve, supozeble la plej granda parto de gulaŝoj, preparitaj hodiaŭ tra la mondo, ne devenas de la origina recepto hungara, sed de la triesta varianto!

Kiel ajn estu, *gòlas* estas la plej ŝatata vianda plado de triestanoj, kiun oftege preparas ankoraŭ hodiaŭ la dommastrinoj kaj kuiristoj de la urbaj restoracioj.

Jen la baza recepto, por kvar personoj, kiuj aprezas grandkvantan manĝon.

Ingrediencoj:

1 kg	da bova aŭ bovida viando, prefere muskola, tranĉita je pecoj el po ĉ. 50 g
1 kg	da distranĉita cepo
duona	glaso da olivoleo aŭ 1 kulero da butero
2	kuleroj da koncentrita tomato
1	kulero da faruno
1	pinĉeto da majorano
2	kuleroj da papriko, laŭ propra gusto, dolĉa aŭ akra
	salo, laŭbezone

En kaserolo, fritetu la cepojn en la elektita grasaĵo, je milda fajro kaj sufiĉe longatempe. Zorgu ke ĝi ne brunetiĝu. Aldonu la viandon, modere salu kaj subrostetu ĝin. Enmetu la koncentritan tomaton kaj unu kuleron kaj duonan da papriko, miksu la tuton dum kelkaj minutoj, antaŭ ol aldoni la kuleron da faruno. De tempo al tempo remiksu la tuton, dum ĉ. 5 minutoj; poste aldonu unu litron da akvo. Aldonu la majoranon kaj ankoraŭ iom da salo, kaj lasu boli la "triestan gulaŝon" unu kaj duonan horon, en la duonkovrita kaserolo. Kontrolu, ke la saŭco ne tro densiĝu, eventuale malpliigu la varmon kaj aldonu iom da akvo, sed nur se vere necese. Kvin minutojn antaŭ la finkuirado kontrolu, ĉu sufiĉas la salo, kaj aldonu la restintan duonkuleron da papriko. Surtabligu akompane de boligitaj terpomoj, pan- aŭ terpom-buletoj, maiza kaĉo aŭ vermiĉeloj, kaj – kompreneble – bonan apetiton!

Por fini, kuriozaĵo:

En la libro "En bankedoj, kuirado de nutraĵoj kaj ĝenerala preparado" (1549), la aŭtoro, Cristoforo Messisbugo[2] priskribas iun manĝaĵon kiu verŝajne povus esti, en iom modifita versio, la antaŭulo de "*goulasch*". La nomo estas en malnova itala lingvo: "*Potaccio di vitello in fracasso ongaresco*", t.e. "Pecetoj el bovida viando en saŭco kuiritaj laŭ hungara maniero".

Jen la tiama recepto:

"Prenu bovidan viandon, tranĉu ĝin en pecetojn kaj ilin rostetu en fandita porka graso. Sekve aldonu ankaŭ bone pistitajn cepojn. Post tio, kiam ĉio fritetita, metu la tuton en poton enhavantan viandan buljonon, aldonu funton da mielo, duonan uncon da pipro kaj cinamo, unu okonon da safrano kaj duonan funton da rosinoj. Kuiru la tuton sur tre milda fajro, ĝis moliĝo de la viando, kaj fine ĉion surtabligu!"

Iom neordinara recepto, ĉu ne?

Daŭrigo je 4-a paĝo

Daŭrigo de la 2-a paĝo

semoj, kiujn la fruktoj entenas; – bestojn, kiujn li, krom ĉasi kiel faris liaj prauloj, eĉ bredas kaj poste mortigas por sin nutri, kaj intertempe ŝtelas la lakton de bovidoj, al kiuj, male, manĝigas specialajn nutraĵojn por ricevi pli bongustan viandon; krome, kiel la grandaj rabo-birdoj, manĝas la ovojn el kiuj la birdidoj devus eliĝi al la vivo; – fiŝojn, kies ovoj, el kelkaj specoj kiaj kaviaro aŭ botargo, iĝas por li la plej frandindaj delikataĵoj.

Sed la homo superas ĉiujn aliajn bestojn: li kapablas murdi samspecajn estaĵojn, kion bestoj ne faras (escepte de nur maloftaj specoj): fakte la rutinaj bataloj inter virbestoj por superregi gregon ne per mortigo finiĝas, sed per submetiĝo de la malvenkanto.

Finfine, kiam la homo kapablas rabi la animon de aliaj homoj, ilin sklavigi kaj eĉ predi ilian identecon, nur unu difino al li apartenas: rabisto.

La plej grandega. *VIGLO*

(*) *"Ĉe la piedoj de Kilimanĝaro"; "Misio Naturo".*

(**) *«Itala Lingva Akademio»: starigita en Florenco (1583), ĝia celo estis la konservado de la itala lingvo. En 1612 estis eldonita la "Vocabolario degli Accademici della Crusca" (Vortaro de la Italaj Lingvo-Akademianoj), kies novan eldonon ĝi iniciatis ekde 1964.*

Tamen oni devas kompreni, ke la ingrediencoj, kiaj mielo, rosinoj, pipro, cinamo kaj safrano, en tiom abundaj kvantoj, estis tre uzataj en tiuj tempoj, preskaŭ ĉie, precipe kiam la ĉefa kuirotaĵo estis viando. Tio nepris, pro la fakto ke la viandon oni "moligis" kaj konservis per tiutempaj metodoj, kaj tial oni devis iel kaŝi la neelteneblan fetoron.

(*) Eltiraĵo el la du-voluma gastronomia libro de Cesare Fonda, fama triesta kuiristo.

(**) Kiu estis Cristoforo Messisbugo? En aŭtografa dokumento, lia nomo troveblas tamen tia: Messi dirita 'Sbugo'! Li naskiĝis en *Ferrara*, fine de 1400-aj jaroj, ŝajne el familio devenanta el Flandrio. Post edziĝo kun nobelino li ekadministris la dukajn bienposedaĵojn de la *Este*-Familio, sed lia ĉefa tasko estis la estrado de la palaca kuirejo, kio konsistis el selektado de la tuta kuireja stabo (ĉefkuiristoj, kuiristoj, servistoj ks), prizorgado de la ĉiutagaj manĝoj de la Sinjoro, proviantado de la nutraĵ-deponejoj, organizado de bankedoj ka. Pro siaj meritoj, li eĉ ricevis la titolon de "palatina grafo". Messisbugo mortis en *Ferrara* en 1549: unu jaron post lia morto estis eldonita lia libro pri la bankedoj, plurfoje represita ĝis la unuaj jardekoj de 1600-aj jaroj. En ĝi troviĝas tuta priskribo de dek vespermanĝoj, tri tagmanĝoj kaj unu festeno, ĉio detalita laŭ la diversaj preparfazoj kun listoj de la rilataj, akompanaj trinkaĵoj, plus kolekto de 315 receptoj. Temas pri tre valora traktaĵo pri tiutempaj moroj kaj kutimoj, krom esti minejo de informoj pri manĝaĵoj, prilaboritaj, pompe kaj inde, por esti surtabligitaj dum kortegaj bankedoj.

Fakte li proponas pladojn el altranga kuirarto, pladojn kiujn ofte li mem ree prilaboras kaj elpensas; foje li transformas en delikataĵojn popolajn receptojn, ĝuste por adapti la preparaĵojn al gustoj de lokaj kaj fremdaj nobeloj. Ĉi libron oni taksas la plej fantazioriĉa kaj kompleta el ĉiuj gastronomiaj manlibroj de la 16-a jc.

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Ĉiam pli interesa fariĝas nia Triesto, ĉu ne? Foje demandoj ne estas facilaj, oni multon devas fosi en la memoro por korekte respondi, sed vin povas helpi ankaŭ konsultado de libroj, priskribantaj ĝin! Oni povas uzi ĉi demandojn ankaŭ por embarasigi tiujn, kiuj asertas esti plej aŭtentikaj triestanoj, perfekte konantaj la historion de sia naskiĝurbo! Aŭ eĉ ili fariĝas cerbotikla argumento dum konversacio kun amikaro. Por la malplispertaj, je 6a paĝo, troveblas la koncernaj respondoj.

1) Kial la Kafejo de l' Speguloj, fondita en 1839 de Nicolò Priovolo, estis tiel nomita?
2) Kiu grava usona ĵazisto koncertis en Triesto, oktobre 1949? Temis pri du koncertoj: unu por la usona armeo kaj la alia, en Teatro Rossetti, por la loĝantaro.
3) Kiu intelektulo, literaturisto kaj arta kritikisto fondis la prestiĝan eldonejon 'Adelphi', donante al ĝi tute specialan karakterizon?
4) Kiom da diversaj flagoj flirtis sur la triestaj mastoj ekde 1915 ĝis 1954?
5) En kiu jaro la Vel-Societo de *Barcola* kaj *Grignano* organizis unuafoje la velboatan regaton *Barcolana*?

Esperantaĵoj



Okaze de la 65a Kongreso de IKUE, estis eldonitaj du Esperanto-talonaj poŝtmarkoj. Ili troviĝas sur du diversaj bazfolioj, montrantaj dudek konstruaĵojn de la urbo Pécs, Hungario. Sur unu folio, la talono montras la kongresan simbolon, dum sur la alia aperas la portreto de la diakono Johano Kirsch, mortinta, junaĝe, pasintmaje. Li estis fervora esperantisto, uzinta nian lingvon en sia familio.



Pliaj detalaj informoj, ankaŭ pri kostoj, haveblas de Marija Belošević: marija.belosevic@zg.t-com.hr. Vizitu ankaŭ la IKUE-ttt-ejojn: www.ikue.org aŭ http://www.ikue.org/kong2012/index.htm.

Plensukcese disvolviĝis la 79a Itala Kongreso de Esperanto, en *Mazara del Vallo*. Ĉirkaŭ 350 italaj kaj eksterlandaj esperantistoj kunvenis en la Sicilia urbeto. Krom viglaj kongreslaboroj, pluraj estis la distraj muzikmomentoj, malfermataj al la tuta loĝantaro, kun partopreno de internaciaj E-artistoj. Dum la semajno, estis nombraj eblecoj ekskursi tra la insulo, kiu per siaj, ĉu historiaj ĉu pejzaĝaj, vidindaĵoj allogis grandan parton de la kongresanaro. Pri *Mazara*, estis presita ankaŭ turisma gvidlibreto en Esperanto. Memore de la kongreso, oni eldonis du diversajn poŝtkartojn, kiujn oni povis dissendi stampitaj per speciala stampo (vidu la supran bildon). Interesatoj povas ankoraŭ ilin mendi rekte skribante al Giovanni Zanaboni, Via San Filippo 52; 58031 Arcidosso (GR) aŭ retmesaĝante al: giovannizana@msn.com

Strato kaj Minejo Esperanto

En Favignana, turisma insulo apartenanta al insularo *Egadi*, troviĝas "*Via Esperanto*", kiun proponis la Esperanto-Centro de Trapani. Ankaŭ la loka malnova minejo el tofo ricevis la saman nomon. Eblas lui loĝejon en privata komplekso, situanta apud tiu minejo. Bicikle oni povas atingi la plaĝon en nur 10 minutoj. Pri prezoj konsultu la jenan ttt-paĝon:

www.esperantovacanze.it

Projekto nomita en Esperanto

La giganta firmao *Google* kaj la kanada kompanio *Cirque du Soleil* (Cirko de la Suno) lanĉis projekton kies nomo estas en Esperanto. Ties titolo estas **Movi.Kanti.Revo**. Temas pri sensora eksperimento, kiu esploras novan formon por navigi en la komputila mondo. La prezentado taŭgas por elmontri la novan tridimensian teknikon de la interreta navigilo *Google Chrome*. La spektantoj sekvas misteran gastigantinon kaj uzas gestojn kaj sonojn por navigi en la etoso kreita de la cirka trupo. La retejo uzos senteman teknologion por kapti la movojn. Nek *Google*, nek *Cirque du Soleil* parolis pri la utiligata tekniko. Oni ankaŭ ne klarigis la kialon de la elekto de titolo en Esperanto. La oficiala publikigo okazos en Septembro. *Inf. Ret-Info*

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Obsede nia amiko VIGLO insistas kun sia senfina sinsekvo da paronimoj. Bv. pacience elteni kaj pardoni lin.

Kapreolo (Zo) remaĉanta mamulo cervsimila (Capreolus capreolus)
Kapriolo kaprica aersalto
Kaporo *(Bo)* g. *(Capparis)* de arbedo dornhava
Kapro *(Zo)* genro *(Capra)* de remaĉantaj mamuloj kun kornoj k barbo

Karpo *(Zo)* granda fiŝo el G. de ciprinoj *(Ciprinus carpa)*
Karpeo *(Me)* ostaro de manradiko
Karpeno *(Bo)* genro *(Carpinus)* de falfoliaj arboj
Karpelo *(Bo)* florfolio, parto de ovario

Kaprico senkaŭza volоŝanĝo
Kapriĉo *(Mu)* kaprica komponaĵo

Karbo hejtaĵo
Karbono kemia elemento
Karbonio geologia epoko

Kardano *(Te)* sistemo de alligo aŭ pendigo per du ortaksaj pecoj
Kardino *(Te)* metala hoko de pordo aŭ fenestro
Kardono *(Bo)* sp. de cinaro *(Cynara ardunculus)* simila al artiŝoko
Karduo *(Bo)* g. *(Carduus)* de dornohava herbo
Karduelo *(Zo)* genro *(Carduelis)* de pasero-formaj birdoj
Kardelo *(Zo)* sp. de karduelo *(Carduelis carduelis)*
Kardo *(Bo)* planto el la tipo de karduo, dornohavaj

Kasedo skatoleto enhavanta bendon aŭ filmon
Kasono* granda akvimuna kestego; fako de plafono

Kaskado akvofalo kun pluraj ŝtupoj
Kaskedo ĉapo kun viziero
Kasko kapŝirmilo

Kaso monkesto
Kazo gramatika kategorio
Okazo tio, kio okazas
Kazeo nefermentinta fromaĝo
Kazuo konscienca dubo pri malfacile prijuĝ-ebla morafero

Kavalerio rajdsoldataro
Kavaliero fortikaĵa teraltaĵo
Kavaliro mezepoka nobelo

Keglo lignaj kolonetoj por specifa ludo
Kuglo municio por pafado

Kero ruĝa emblemo por ludkartoj
Koro *(Me)* ĉefa organo de sangrondirado
Kor'o Biblia mezurunuo de kapacito

Klaŭzo specifa kondiĉo en kontrakto ks
Kluso faŭko por ĉenoj ĉe l' antaŭo de ŝipo
Kluzo ŝipbaseno, fermebla per pordosimilaj akvobariloj

Kibico ĝena kartluda spektanto
Kibuco kooperativa vilaĝo en Israelo

Klavario *(Bo)* g. *(Clavaria)* de manĝeblaj fungoj
Klavaro vico de klavoj en instrumento

Klingo metalplato de tranĉilo ks
Klinko movebla pordfermilo

Kolizio fortega kunpuŝiĝo
Koluzio sekreta interkonsento

Kolumno parto de gazetpaĝo
Kolono subtenilo de konstruaĵoj
Kolumo vestoparto cirkaŭanta la kolon

Komao *(Mu)* intervalo de du notoj
Komato nenormala peza dormo
Komo interpunkcia signo

Kombi aranĝi hararojn
Kombini kunaranĝi

Komisio tasko de komisiito
Komisiono grupo komisiita plenumi ion

Komplemento kompletigaĵo
Komplimento flataj gratulvortoj

Kompreni kapti signifon
Kunpremi premi kune

Komuniko sciigo
Komunio partopreno en Eŭkaristio
Komunumo administra distrikto

Konduki irigi al iu loko; gvidi, zorgi pri vojirado
Kondukti ebligi trapason al iu formo de energio
Konduti agi bone aŭ malbone

Konekti kunigi per konduktilo
Konjekti supozi, hipotezi

Konfekcio amasproduktado de vestopecoj
Konfesio ĉiu dividita parto de la kristana religio
Konfeso spontanea deklaro de konfesanto

Konfidi plenkredi ies honestecon
Konfiti konservi fruktojn en densa sukersiropo

Kongro *(Zo)* genro *(Conger)* de grandaj angilo-formaj fiŝoj
Kongruo interkonformeco

Konscienco konscio pri morala bono k malbono, pri morala devo
Konscio klara spirita kompreno

Konsento akordo, samopinieco
Kunsento simpatio

Konsolo kuraĝigaj paroloj
Konsulo diplomata agento
Konzolo elstaranta ornama ŝtona, ligna, metala peco

Konveni esti konforma al la situacio
Kunveni veni kune

Konvergi celi al sama punkto
Konversi konversacii
Konverti alkonduki iun al alia religio

Korbo portebla plektaĵo el salikvergetoj
Kordo *(Mu)* fadeno por muzikaj instrumentoj
Korko kverkoŝelo; ŝtopilo por boteloj ks
Korso larĝa strato aŭ aleo, pri plantita per arboj servanta kiel urbopromenejo
Korto cirkaŭbarita spaco apuddoma
Korvo *(Zo)* g. *(Corvus)* de paseroformaj birdoj

***** *Malofta ekzemplo de "Homonimoj" en esperanto.*

Septembra Programo	
07 vendredo	19h00 - Unua, postferiada, renkontiĝo en TEA-sidejo: gasto nia aŭstra membro Folkmar Koller. Resumo pri somero 2012.
09 dimanĉo	Festo de Amikeco sur Monto *Forno.* Petu informojn!
11 mardo	18h00 - Konversacia Rondo kun Folkmar Koller
14 vendredo	20h00 - La Dia Komedio, komparo inter la esperanta kaj triesta tekstoj
18 mardo	18h00 - Posttagmeza renkontiĝo
21 vendredo	20h00 - El la Esperanta gazetaro
25 mardo	18h00 - Posttagmeza renkontiĝo
28 vendredo	20h00 - Esperanto pere de Interreto
Oktobra Programo	
02 mardo	18h00 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj
05 vendredo	20h00 - La Dia Komedio, komparo inter la esperanta kaj triesta tekstoj
09 mardo	18h00 - Kurso de Esperanto
12 vendredo	20h00 - Niaj paĝoj en Interreto
14 dimanĉo	09h30 - BARCOLANA! Starto de la plej amasa velboata regatto en la Mediteranea maro
16 mardo	18h00 - Kurso de Esperanto
19 vendredo	20h00 - Fotoj pri Armenio - Elda
23 mardo	18h00 - Kurso de Esperanto
26 vendredo	20h00 - Vojaĝo tra Armenio, filmo de Edvige
30 mardo	18h00 - Kurso de Esperanto

AŬTUNE, ferioj en kastelo!

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj de la 27-a de oktobro ĝis la 3-a de novembro 2012

KURSOJ

★ Svetlana Smetanina (Moskvo) Paroliga progresiga kurso
★ Bert Schumann: Cseh-metodo por komencantoj

AKTIVAĴOJ

★ Kees Ruig (Nederlando): Ateliero pri muzika improvizado kaj kunludado kun viaj instrumentoj
★ Bert Schumann: Amuzaj aktivaĵoj
★ Kees Ruig: Mantro-ateliero - konatiĝu kun via voĉo
★ Svetlana Smetanina: Prelegoj pri sia granda lando
★ Kees Ruig: Akordiona koncerteto de popola muziko

Detaloj en http://gresillon.org/autune
Reta aliĝo en http://gresillon.org/aligha

Kore invitas vin Kulturdomo de Esperanto château de Grésillon 49150 St-Martin d'Arcé, France gresillon.org - kastelo@gresillon.org

Respondoj al demandoj pri Triesto (je 4ª pĝ):

1) Granda nombro da speguloj ebligis 'enkapti' la sunsubiran lumon por plilongigi la malfermon de la kafejo je almenaŭ duonhoro, kio ŝparigis la bruloleon de la lampoj.
2) Luis Amstrong. Bedaŭrinde la koncerto dediĉita al triesta publiko ne estis amase de ĝi spektita pro la troe alta kosto de la enirbileto: 3.500 liroj.
3) Bobi Blazen (Trieste, 1902- Milano, 1965). Li estis amiko de Umberto Saba, Italo Calvino kaj Eugenio Montale. Grava lia merito estis la diskonigo en Italio de la verkoj de Sigmund Freud, Franz Kafka, Carl Jung ka.
4) Entute sep: la flago aŭstra-hungara ĝis 1918; tiu de la Savoja dinastio ĝis 1943; la Tria-regna flago ĝis 1945; tiu jugoslavia de aprilo ĝis majo 1945; tiuj brita kaj usona ĝis 1954 kaj, ekde la samjara oktobro, la trikolora itala flago.
5) En 1969. *Barcolana*, kiu okazas je la dua oktobra dimanĉo, disvolviĝas laŭ triangula itinero longa ĉ. 16 mejlojn. En ĝi rajtas partopreni boatoj longaj ekde 6 metroj. La unua konkurso havis 51 partoprenantojn, en ĉi lastaj jaroj al tiu ĉi evento aliĝas eĉ pli ol 1500 vel-boatistoj el la tuta mondo.

Bedaŭrinda perdo!



La renoma verkisto **Harry Harrison** forpasis la 15-an de aŭgusto en Crowborough (Anglio). Li naskiĝis la 12-an de marto 1925 en Stamford (Konektikuto, Usono). Harrison lernis Esperanton en sia junaĝo kaj estis membro de UEA jam ekde 1945. En 1985 li estis elektita al la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Irlando kaj honora membro de la usona landa asocio Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (nun Esperanto-USA).

Harrison famiĝis pro siaj sciencfikciaj romanoj, en kiuj ofte aperas mencioj pri Esperanto kiel lingvo de la estonta mondo kaj ankaŭ specimenaj tekstoj en Esperanto, kvankam ne ĉiam en ortodoksa formo. La plej fama parto de lia verkaro estas la serio pri la "Rustimuna Ŝtalrato". Unu libro de la serio, "La naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato", aperis en Esperanta traduko en 1996 ĉe Sezonoj kaj estas nun senpage elŝutebla. Jam pli frue Sezonoj eldonis lian novelon "La stratoj de Aŝkelono" (1994). La unua Esperanta traduko de verko de Harrison estis "La verda estonteco", sciencfikcia novelo pri Irlando, kiu aperis ĉe Esperanto-Asocio de Irlando en 1984. En 2001 Impeto eldonis tradukon de lia romano "La kaptita universo", kiu, voĉlegita de la tradukinto Andrej Grigorjevskij, en 2004 aperis ankaŭ sur kompakta disko.

El Gazetaraj Komunikoj de UEA – N° 469

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093 - 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina - www.esperantotrieste.it
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349